

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 6

Novembro/Decembro 1965

Jarkunveno en amika sfero

Denove kolektiĝis en Stuttgart inter la 15a kaj 17a de oktobro 1965 110 esperantistaj fervojistoj, inter ili 35 gastoj el 8 aliaj landoj, por la 9a jarkunveno de la „Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA)“. La modele organizitaj aranĝoj, forte atentitaj de la fervoja administracio kaj socialorganizo, de la sindikatoj kaj gazetaro, pasis en bona harmonio.

Estas jam tradicio de naŭ jaroj, ke la membroj de nia asocio renkontiĝas unufoje poŝare en la kadro de la Fervoja Socialorganizo. Ĉiujare invitas alia distrikto. Ni bone rememoras pri la lastjara programo en Solingen. En 1965 gastigis la GEFA-anojn la vaste konata „grandurbo inter arbaroj kaj vitejoj“. La kongresanojn alvenintajn en la stacidomo informis bonaspekta tabulo, ke la „akceptejo“ troviĝas nur kelkajn centojn da metroj en la bierfarejo „Wulle“. Jam oni rigardis la grandan flagon de GEFA. Afablaj LKK-anoj bonvenigis kaj disdonis la kongresdokumentojn, prospektojn de la gastiganta urbo kaj donacojn de porfervojistaj asekuroj. La loĝigo iom suferanta sub aliaj samtempaj kongresoj tamen havigis liton por ĉiu.

Gazetara konferenco

Jam matene de la 15a de oktobro kelkaj ĵurnalistoj kaj raportistino de la radiostacio estis informitaj pri la Esperantomovado ĝenerale kaj aparte pri la laboro de la germanaj esperantistaj fervojistoj. La eho en la gazetoj estis pozitiva. Oni akcentis ankaŭ la porklientan praktikadon de Esperanto per la Germana Federacia Fervojo en horaroj kaj prospektoj. Radio „Südwestfunk“ elsendis la intervjuon la 16an vespere.

Estrarkunsido kun multaj problemoj

La Esperantomovado ne prosperas nur per rutinaj, nemodifitaj metodoj. Ne sufiĉas nur gajni novajn adeptojn. Faka asocio devas dediĉi sin ankaŭ al tiucelaj taskoj. Por la ĝenerala klerigo kaj perfektigo la Centra Biblioteko estas pluevoluigata. La titollisto klasifikota laŭ la grado de la perfekteco estos nove eldonata. La fakvortaro enhavonta 1900 terminojn esperantajn-germanajn kaj inversajn estas laŭ informo de ges-roj Ritterspach preskaŭ prespreta. La projekto traduki 11000 terminojn de la noveldonita leksikono de UIC (Unio Internacia de la Fervojoj) provizore devas esti rezignata. Inter la esperantistaj fervojistoj nuntempe ekzistas nek la bezono pri tiel granda stoko de terminoj, nek reala ŝanco eldoni ĝin proprakoste. Post tri jaroj oni ekzamenos, ĉu suplemento kun plujaj terminoj nepre necesos.

Kompreneble ankaŭ la preparoj por la 19a IFEF-kongreso en Fulda estis objekto de vasta diskuto. Organiza kaj financa plano helpas koordinigi la multnombrajn detalojn laŭ ilia sinsekvo. Ĉio, kio devos esti prezentata dum la 18a IFEF-kongreso en Utreĥt, estos disponebla ekz. laborkapabla Loka Kongresa Komitato, kadra programo, glumarkoj kaj unuaj informoj.

Ekzameninte la „kampanjon“ de Sekelj (Jugoslavio) la estraro decidis ne partopreni ĝin, ĉar la kapablaj personoj de GEFA jam agas en tiu senco laŭ siaj povoj. Krome estis pritraktataj aferoj de la IFEF-regularo, Esperanto-muzeo, ligoj kun la kontraŭ-alkoholuloj, peticio al UNO ktp.

Vigla laborkunsido

GEFA-prezidanto Gießner salutis d-ron Kühne, ĉefestraron de la Fervoja Socialorganizo kun lia bonkonata kunlaboranto s-ro Rummel, krome la estraranojn kaj komisiitojn de 15 distriktoj. Mankis nur la delegito de unu distrikto. La reprezentantoj de la Fervoja Socialorganizo substrekis la intereson pri la laboro de GEFA.



Laborkunsido kun la distriktkomisiitoj

Unu el la plej gravaj taskoj estas la varbado inter gekolegoj, precipe inter la junaj. Jam nun devas tiurilate komenciĝi la laboro pro la 19a IFEF-kongreso. La komisiitoj raportis pri siaj spertoj kaj sukcesoj ekz. helpe de magnetofono, vizito de eksterlandanoj, vojaĝoj al eksterlando. Oni donis sugestojn por la fakprelejoj de IFEF-kongresoj kaj decidis okazigi la jarkunvenon 1966 en Uelzen (distrikto Hannover). Krome staris sur la tagordo organizaĵaj demandoj ekz. la ŝanĝo de kelkaj komisiitoj.

Rondveturado sen suno

Kiam okazis tiu laborkunsido, la plej multaj celis per ruĝa fervoja buso al la televida turo esperante ĝui de sur tie rondrigardon super la alitempe mirinde aspekta urbejo. Sed la vetero ne estis bona kiel la aliaj aranĝoj. Tamen oni povis facile

konjekti, kiel bele situas Stuttgart. Promenante tra la vasta parko de la „Killes“-monto, kie okazas forte frekventitaj ekspozicioj, la kongresanoj admiris la buntecon de la aŭtuno kaj profitis la trankvilecon de vojoj malplena de homoj. En la urba centro la omnibuso devis klopodi por trovi sian vojon laŭlonge de traboritaj avenuoj, kie estas konstruata subtera tramlinio. Nova kaj Malnova Kastelo, modernaj konstruaĵoj, kelkaj preĝejoj savitaj aŭ rekonstruitaj post la terura milito — ĉio povis postlasi bedaŭrinde nur provizoran impreson, ĉar la tempo ne permesis rigardi longtempe.

Sukcesplenaj lingvaj ekzamenoj

Evidentiĝas, ke tia renkontiĝo prezentas konvenan okazon por fari la oficialan ekzamenon de la lingva kapableco. Feliĉe GEFA disponigas pri propra lingva komisiono sub la gvidado de d-ro Lang, kiu sufiĉe severe ekzamenis kvin kandidatojn, sabaton en la skriba parto kaj dimanĉon en la buŝa parto; la ĉilasta estis publika kaj bone vizitita. Ĉiuj kvin kandidatoj, inter ili knabino, plenumis kontentige la kondiĉojn de la ekzameno. La komisiono prezentis ilin al la publiko, kaj s-ano Schalmey, la delegito de la fervojista sindikato (GdED), demonstris ties intereson pri tiu parto de la programo transdonante al ĉiuj ekzamenitoj ampleksan bildlibron pri Germanio.

Festvespero en digna kadro

Kulmino de la jarkunvena programo estis la festa kaj distra vespero en la kongresejo sabaton (16. 10.) vespere. La salonegon plenigis ĉ. 220 personoj. La florentina marŝo enkondukis la programon. La komisiito por la distrikto Stuttgart, s-ro Kiefer, malfermis la vesperon dankante al tiuj instancoj, kiuj ebligis tiun kunvenon. GEFA-prezidanto Gießner bonvenigis ĉiujn kaj akcentis la celon de la renkontiĝo: eluzi la propran lingvan scipovon, kontaktiĝi kun samideanoj, ankaŭ eksterlandaj gastoj. La jarkunveno okazas ĉiujare en alia fervoja distrikto, do en alia parto de Germanio. Aliaj gastoj ĉeestas kaj aliaj ĵurnalistoj. Ĉiam denove multaj estas surprizitaj pro la faktoj, kiujn ili ekscias pri la Internacia Lingvo. Pri la taŭgeco de Esperanto ili estas pli multe konvinkitaj ol antaŭe. La parolanto salutis speciale la honorgastojn.

D-ro Holstein transdonis la salutojn de la malhelpita fervoja prezidanto. Li parolis samtempe



D-ro Holstein salutas nome de la fervoja direkcio

por la estraro de la distrikta socialorganizo, kiuj estis reprezentata krome per la sinjoroj d-ro Kuohn kaj Schirl. S-ro Hartmann de la urba trafikoficejo transdonis la bondezirojn de la urba administracio. Sekvis s-ro Schalmey, longjara esperantisto, ĉefestrarano de la sindikato GdED, s-ro Lotterer, distrikta estrarano de la sindikato GdBA, kaj s-ro Streckfuß, distrikta estrarano de la sindikato GdL. Tre ĝojige estis, ke la parolintoj parte uzis la Internacian Lingvon. Kiel kutime estis dum aranĝoj kun internacia karaktero, salutis ankaŭ la reprezentantoj de eksterlandaj fervojistaj asocioj, nome el Aŭstrio, Danlando, Francio, Hispanio, Hungario, Jugoslavio kaj Svislando. Speciale koran aplaŭdon ricevis la vicprezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), s-ro Walder el Romanshorn (Svislando). La vicon de la alparolantoj fermis kun koraj bondeziroj la sekretario de la Germana Esperanto-Asocio, s-ro Pickel el Nürnberg.

GEFA-prezidanto Gießner poste laŭlegis

la jarraporton

en konciza formo. Rilate organizajn aferojn novaj distrikt-komisiitoj deĵoras en jenaj distriktoj:

Augsburg: BI Sturm, BA Kempten, anstataŭis s-anon Schiefl.

Kassel: BOS Tasler, Büro Ps, transprenis la kutimajn laborojn de distriktkomisiito, kvankam s-anon Keil ankoraŭ restos komisiito.

München: BOS Pollinger, Hk München, anstataŭis s-anon Baader pro lia malbona sanstato.

Dankon al tiuj, kiuj estis pretaj preni sur sin la taskojn same kiel tiuj s-anoj, kiuj donis ĝis nun siajn fortojn por la bono de GEFA.

Konsiderinde plintensigis la rilatoj al la sindikatoj post longtempaj klopodoj. Nun reprezentantoj de ĉiuj sindikatoj ĉeestas la jarkunvenojn por informi sin pri la taŭgeco de la Internacia Lingvo. Ankaŭ la ĝeneralaj rilatoj plifortiĝis. Tio montriĝis en pli multaj artikoloj resp. notoj aperintaj en diversaj sindikataj revuoj, sed precipe dum tiu jaro en la preteco partopreni en la kolektado de subskriboj. La peticion al la Unuiĝintaj Nacioj subskribis kolektive jenaj sindikatoj: GdED, GDBA, GdL kun entute 587000 membroj. Krome subskribis ankaŭ la ministro por la trafiko, d-ro Seeböhm.

Raportoj pri aranĝo de GEFA resp. IFEF kaj informartikoloj pri la peticio al UNO aperis en *Sozialblatt* (eldonkvanto: 320000), *Sozialzeitung* de la distrikto Hannover, (eldonkvanto: 40000), *Der Bundesbahn-Inspektor* (eldonkvanto: 7000), *Die Bundesbahn*, oficiala organo de la Germana Federacia Fervojo, kaj en *Bundesbahnmittellungen*. La Dokumenta Servo de DB envicigis ankaŭ tiujare la germanlingven tradukitan tekston de la kongresa fakprelego. Seninterrompe de 1953 aperas esperantigitaj tekstoj en la horaroj. Tiun modelon sekvis intertempe ses aliaj fervojaj administracioj. La projektita fakvortaro bone progresis.

GEFA estis reprezentita ĉe la 17a IFEF-kongreso en Hamar (Norvegio) de 87 membroj resp. familianoj. GEFA-prezidanto daŭrigas la kunlaboron en la statuta komisiono transprenitan de s-ano Barnickel.

En la 16 distriktoj oni parte laboris diligente kaj lerte, kiel oni povas legi en la rubriko „el la grupoj“. Ĉiuj kunlaborantoj, ĉu komisiitoj, grupestroj aŭ membroj meritas specialan dankon. Aparte menciindaj estas en la distriktoj

- Frankfurt:** prelego de s-ano Denk antaŭ la junularo de la sindikato GdED,
Hamburg: ekspozicio aranĝita de s-ano Lepke,
Mainz: komuna kunveno kun Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo organizita de s-ano Ritthaler en Neustadt (Weinstr.),
Hannover: prelego de s-ano Gießner antaŭ distriktaj junulargvidantoj de la sindikato GdL,
Regensburg: gastigado de 18 francaj gejunuloj en la Bavara Arbaro organizita de s-ano Wiesmann,
Saarbrücken: ekspozicio aranĝita de s-ano Haupenthal,
Stuttgart: ekspozicio aranĝita de s-ano Kiefer,
Wuppertal: prelego de s-ano Grass antaŭ distriktaj grupestroj de la sindikato GDBA.

Rilate la estontajn aranĝojn elstaras la 19a IFEF-kongreso 1967 en Fulda. Por ĉiuj validas la slogano „Multnombre havigu amikojn dum internacia kongreso de fervojistoj en Germanio“. La organizaj preparoj jam komenciĝis.

Post la Esperanto-himno majstre prezentita de la fervojista virhorso Stuttgart sub ĝia direktoro Läßle sekvis du kantoj por baritono kaj piano (kantisto Kurt Neumann). La virhorso ĝojigis denove la ĉeestantojn per tri popolkantoj, kies modelan tradukon el la germana lingvo estis prizorginta s-ano Gießner. Tiu parto de la vespero demonstris denove, kiel bone taŭgas la Internacia Lingvo kiel peranto de kulturo. Ankaŭ tiujare grupo da entuziasme ludantaj francoj kontribuis al la vespera programo prezentante gajan skeĉon pri perdiĝinta kolumbutono. Koran dankon al ĉiuj. Kiel kutime la dua parto de la vespero konsistis el viglaj danĉritmoj. Ne mirinde, ke kongresanoj kaj gastoj ĝuis, laŭ aĝo kaj temperamento, agrablajn melodiojn kaj akcelajn taktojn. Ŝajnas, ke tiu vespero entute kontentigis ĉiujn.

La dimanĉa mateno kunigis la interesulojn por specifa programo. Talenta aktoro sciis altiri la atenton al sia rolo en la drameto unuakta „La advokato“ de Jaques Cossin. La prezentado brile sukcesis. Michel Audibert ricevis tondran aplaŭdon kaj florojn pro sia arto en Esperantujo. La bonegan tradukon verkis Jean Thierry.

Multnombraj diapozitivaj lerte prezentitaj kaj sonbende akompanitaj de s-ano Ritterspach ankoraŭfoje vekis rememorojn pri la pasinta IFEF-kongreso en Norvegio. La kongresanoj travivis la stadiojn de la longa vojaĝo, la printempajn kolorojn kaj multajn scenojn el la riĉa

programo. La tagmanĝo kunigis ankoraŭfoje la kongresanojn.

Posttagmeze la plej multaj sekvis la inviton vojaĝi komune al la najbara urbo Ludwigsburg. Celo de la ekskurso estis la grandioza baroka kastelo kun ĝia vasta parko. La suno brilumis sennombrajn florojn kaj la flavajn murojn de la impona konstruaĵo. Amasoj da homoj svarmis kaj ĝuis la aŭtunan belecon. Infanoj sentis sin feliĉaj en la aparta ĝardeno kun multnombraj scenoj el germanaj fabeloj. Oni adiaŭis konvinkite, ke la 9a jarkunveno de GEFA estis plena sukceso dank' al la laŭdindaj preparoj kaj laboroj de la L.K.K. Dankon al ĉiuj. W. B.

Herbsttreffen in Stuttgart

Esperanto lebt aus dem persönlichen Umgang mit Gleichgesinnten, aber es sucht auch die Begegnung mit der Öffentlichkeit. Unter diesem Leitgedanken steht das alljährliche Treffen der deutschen Eisenbahner-Esperantisten. In diesem Jahr war Stuttgart der Tagungsort, der Großstadt zwischen Bergen und Reben. Welcher Anziehungskraft sich die schon traditionelle Jahresversammlung erfreut, bewies die Teilnahme ausländischer Sprachfreunde aus Dänemark, Frankreich, Jugoslawien, Österreich, der Schweiz und der Sowjetunion, aus Spanien und Ungarn.

In zwei Arbeitssitzungen beschäftigten sich Vorstand, Bezirksbeauftragte und Vertreter des BSW-Hauptvorstandes mit zahlreichen Fragen organisatorischer Art und den angelaufenen Vorbereitungen zum internationalen Kongress 1967 in Fulda. Wiederum unterzogen sich einige Sprachfreunde mit Erfolg der Sprachprüfung, die von eigenen Prüfungskommissaren geleitet wurde.


Die meisten Tagungsgäste ließen es sich trotz dem diesigen Wetter nicht nehmen, an einer Rundfahrt zum Fernsehturm und dem großartig angelegten Ausstellungspark auf dem Killesberg teilzunehmen. Auf dem Fest- und Unterhaltungsabend konnte der Vorsitzende der „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten“, Herr Gießner, zahlreiche Ehrengäste der Bundesbahnverwaltung, des Bundesbahn-Sozialwerkes, der Gewerkschaften, der Stadtverwaltung und ausländischer Landesverbände begrüßen. Vertreter dieser Stellen betonten ihrerseits — teilweise in formvollendetem Esperanto — ihre Verbundenheit mit der Idee der Internationalen Sprache. Einen nachhaltigen Eindruck hinterließen Solodarbietungen, Männerchöre und das Lustspiel einer französischen Jugendgruppe. Über die geleistete Arbeit unterrichtete ein Jahresbericht. Auch die Tanzlustigen kamen anschließend auf ihre Kosten.

Im Rahmen eines Sonntags-Matinées überraschte das Können eines französischen Esperantisten in einem

Einpersonen-Drama. Eine vertonte Dia-Serie vom diesjährigen internationalen Kongress in Norwegen weckte zahlreiche Erinnerungen. Wer anschließend das herbstlich-sonnige Wetter zu einem Besuch des Schloßgartens in Ludwigsburg ausnutzte, kam voll auf seine Kosten. Presse und Rundfunk würdigten positiv Arbeit und Tagungsverlauf.

Den Organisatoren sei herzlichst gedankt, vor allem dem Bezirksbeauftragten, Herrn Kiefer aus Stuttgart.

W. B.



Otto-Friedrich Denk 65 jaraĝa

Estas apenaŭ kredeble, ke tiu ankoraŭ tiom elaste efika samideano kun sia gaja mieno jam atingis „bibliano“ aĝon. Nu, eble nia amiko Denk estas vivanta ekzemplo por tio, ke la okupado pri Esperanto vere konservadas la junecon.

Jam baldaŭ post la dua mondmilito, kiam en la distrikto Frankfurt kunvenis amikoj de la Internacia Lingvo por eklerni ĝin, kolego Denk fervore partoprenis. Ne estis mirige, ke lin, iaman gimnazianon el Offenbach, kiu pene studis la anglan, francan kaj latinan lingvojn, kiu pli poste kiel matura homo okupis sin pri la rusa kaj itala lingvoj, ke lin sorĉigis Esperanto. Estis memkompreneble ke li post kelka tempo faris la kapablecan kaj kursgvidantan ekzamenon, kaj same klare estis ke li dum longaj jaroj gvidis la gravan oficon de l'GEFA-Kasisto. Ĝus pro tio la asocio ŝuldas al li multan dankon, dankon pro seninterrompa, afabla kunlaboro. Preskaŭ ĉiujn IFEF-kongresojn li vizitis kaj, estante tie kaj tie en fremdaj urboj, en Universalaĵ Kongresoj, en feriaj semajnoj, li akiris konsiderindan nombron de amikoj, kiuj ĉiuj estas ligitaj al li en kora afableco. Kaj ĉie kaj ĉiam li senlace provas gajni novajn simpatulojn por la Internacia Lingvo. Antaŭ nelonge — okaze de longa marvojaĝo — li transdonis al la storma maro botelon kun Esperanto-salutoj, kiu, trovita de franco, havigis al li korajn salutojn el nekonata urbo ĉe la atlantika marbordo. Ni deziras al nia meritplena amiko, ke la sorto donu al li ankoraŭ multajn jarojn plenajn de sano, por ke la gajejo de lia koro kaj lia persistema fervoro restu modelaj ekzemploj por multaj indiferentuloj.

GEFA-estraro

Ĉe amikoj en Sudorient-Eŭropo

Alloga celo staris antaŭ niaj okuloj, kiam ni pripensis la someran feriovojaĝon: estis la Prespa-Lago en Makedonio. Malnovaj geamikoj en Skopje estis invitintaj mian edzinon kaj min pasigi la libertempon kune kun ili en hejmo de la Jugoslavaj Fervojoj. Danke ni akceptis tiun afablan inviton. Kaj kio estis pli konvena ol

ĉi-okaze ankaŭ viziti niajn hungarajn geamikojn en Budapeŝto? Ĉiu, kiu partoprenis la IFEF-Kongreson en Budapeŝto, memoras pri la kora ĝentileco de la tiaj kolegoj. Superflue do diri, ke ankaŭ ni nur povas substreki tion. De l'alvena momento ĝis la fina adiaŭo la delikata zorgemo de d-ro Bacskai kaj ties helpantoj daŭre donis al ni la senton, ke ni tute ne troviĝis en fremda lando, el kies lingvo ni nenion povis kompreni.

Survoje al Makedonio ni restis unu tagon en Belgrado, kie niaj tiaj amikoj de JAFE faris ĉion por agrablighi al ni la mallongan restadon en la ĉefurbo. Tio eĉ okazis en internacia rondo, ĉar samtempe ĉeestis nia finna kolego Narvala. La bonveno en Skopje estis korega. Ni havis okazon admiri la spite al la terura tertremo en 1963 ankoraŭ vere vidindajn pitoreskajn malnovajn kvartalojn same kiel la okultrapajn progresojn, kiujn faris Skopje en la novkonstruado de la detruitaĵ urboj.

Belega aŭtoveturado tra la makedonaj montoj kaj du semajnoj ĉe la bordo de Prespa-Lago sekvis. Ili pasis tro, tro rapide. Ĉirkaŭis nin la amika afableco de familio Polenak el Skopje, kio kaŭzis, ke ni ek de la unua momento sentis nin hejme inter pli ol 200 jugoslavaj fervojistoj. Ankaŭ inter ili ni trovis esperantistojn kaj interligis nin fine kun multaj el la jugoslavaj kolegoj agrablaj kontaktoj, rezultantaj el la komuna ĝuado de suno, strando kaj banado. Estis sinfonio de ĉarma, belega pejzaĝo ĉe la trilanda renkontiĝo de la limoj de Jugoslavio, Grekio kaj Albanio, de varma, plenkura akvo en alteco de 850 m kun la ĉirkaŭaj montoj, pli ol 2000 m altaj, kaj de pentrindaj vilaĝoj netuŝitaj de la niveliganta tekniko. Tiu sinfonio kune kun la gastamaj homoj faris travivi nin neforgeseblajn tagojn.

Ankoraŭfoje profundan dankon al ĉiuj amikoj en Hungario kaj Jugoslavio, kiuj tiom afable zorgis por ni. Jen ni eksciis, kion signifas esti Esperantisto.

J. Gießner

El la grupoj

Duisburg-Wedau. La oktobran kunvenon en la rondo de „Kreis der Esperanto-Freunde Duisburg“ partoprenis la dana kolego Frede Jensen kaj lia edzino el Aarhus. Ili prezentis kolorajn lumbildojn pri sia bela urbo Aarhus, kiu estas en bona memoro pro la 9a IFEF-kongreso.

Hermanns

Neustadt (Weinstr). La 24an de oktobro komuna aranĝo de la Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo kaj de la GEFA-distrikto Mainz kunigis konsiderindan nombron de gesamideanoj en Neustadt (Weinstr). S-ano Rössler el Speyer faris la ĉefreferaĵon okaze de la „Tago de Unuigitaj Nacioj“ pri „Dudek

jaroj da UN-laboro“. Pri la „Mondeks-pozicio de la trafiko München 1965“ s-ano Ritthaler, la GEFA-komisiito por la distrikto Mainz, montris allogajn dia-pozitivajn kaj komentariis ilin. Posttagme oni ĝuis ŝatatan vinprovadon.

Ritthaler

Weiden. La fervojista grupo regule kunvenas ĉiun jaŭdon. Dum la lastaj monatoj okazis kurso por komencantoj kaj alia por progresintoj, la ĉilasta gvidata de s-ro Stahl. La grupan vivon vigligis eksterlandaj vizitintoj ekz. du danaj aŭtomobile vojaĝantoj. La grupa prezidanto König povis saluti finnajn Esperantistojn el Turku, kiuj tranoktis en la junulargastejo de Weiden.

Dipl.-inĝeniero Haferkorn transloĝiĝinta al Weiden raportis en la grupo pri sia vasta terminara laboro. S-ano König prelegis pri la IFEF-kongreso en Norvegio, la GEA-kongreso en Düsseldorf kaj pri vojaĝoj al esperantistoj en Aŭstrio kaj Hungario. Multajn travivaĵojn sciis rakonti s-ano Landgraf, kiu partoprenis vojaĝon al Pollando en la kadro de la fervojista turismo. Oni vizitis la metropolon de Ĉeĥoslovakio, Varsovion kaj Krakovon. Pro tio, ke li estis la unusola esperantisto en la vojaĝgrupo, liaj ŝancoj esti rekonata laŭ la verda stelo estis neatendige grandaj. Kiel esperantisto ĉie li estis kore bonvenigata.

König

Naŭlanda renkontiĝo

La pramsipo veteranta de Friedrichshafen alproksimiĝis al la svisa bordo. Klare ekkonebla flirtis ĉe la havena baseno la Esperanto-flago. Ĝi demonstris la aktivecon de malgranda Esperantogruppo, kiu organizis la 25/26an de septembro 1965 internacian renkontiĝon en Romanshorn.

Pli ol 100 gesamideanoj estis venintaj, el Germanio bedaŭrinde nur malmultaj, kvankam la aŭtuna beleco brilumis lokon kaj lagon. Loka muzikistaro akompanis la solenan inaŭguron de la „Esperanto-Weg“, la unua de tiu nomo en Svislando. Espereble imitos tiun modelon aliaj komunumoj de tiu lando, kiu ŝatas esti taksata kiel kosmopolitika. Siajn bondezirojn transdonis al la multnombraj ĉeestantoj la reprezentantoj de la komunumo Romanshorn kaj de la Svisa Esperanto-Asocio. Sekvis salutoj de Aŭstrio, Bulgario, Francio, Germanio (GEA-sekretario Pickel), Hungario, Nederlando (IFEF-prezidanto de Jong), Pollando kaj Portugalio. S-ro Walder, la organizinto de la ĝisnunaj trilandaj renkontiĝoj kaj cetere vicprezidanto de IFEF, ricevis kun siaj familianoj multflankan dankon pro lia persista laboro. La televido kaptis la scenon de la inaŭguro.

La vespero staris tute sub la signo de distrado. Bongustan vespermanĝon alportis ĝentilaj kelnerinoj. La komunumestro demonstris sin kiel simpatianta apoganto de la esperantismo. Bonkonata sorĉisto kaj ventroparolisto gvidis tra la programo. Du hungarinoj montris popoldancojn. Ne mankis kantoj el Aŭstrio. Multfoje pakumita paketo liveris amuzajn premiotajn taskojn.

La sekva dimanĉo komenciĝis per gvidado tra la vilaĝa kerno, kie ŝpuroj el la romania epoko ankoraŭ estas rekoncible. La trankvilan lagon brilumis aŭtuna suno. Bedaŭrinde grizaj nuboj poste minacis, kiam la ŝipekurso komenciĝis. Post komuna tagmanĝo sekvis denove serio de prezentadoj: bildoj pri la ĉijara UE-kongreso en Japanio, la svisa feriosemajno en Caslano, la inaŭguro de la tutmoderna Esperanto-monumento en Linz (Aŭstrio), krome mallongaj prelegoj pri la agado de la esperantistoj en la „jaro de la internacia kunlaboro“ kaj pri la eŭkumena movado inter la katolikaj esperantistoj. Simpatiaj knabinoj ludis klasikan muzikon.

Dankon elkoran al la organizintoj kaj kontribuintoj. Mi ĝuis tiun renkontiĝon kaj ne perdos la esperon, ke ankaŭ estonte oni renkontiĝos ĉe la trilanda lago. W.B.

Anonco

Dum januaro 1966 la Esperanto-Rondo en Opole festas sian 10jaran jubileon. Krom ekspozicio okazos letersvespero. Interesuloj skribu al: Pola Esperanto Asocio, Filio en Opole Opole, Pollando.

Novaj presajaĵoj

... el Belgio

La unuajn paŝojn sur la tereno de la mondfederalismo faras nova gazeto, kiu certigas, ke ĝi ne reprezentas (novan) partion. Sendube estus grava la morala kaj financa subteno de tiu ideo flanke de la esperantistoj.

„eŭropo“, 16 p., 20,5 x 16 cm. Eldonanto: S. A. EUROPA EEN, Prins Bouwdewijlaan 323, Wilrijk, Belgio.

... kaj el Danlando

En ses lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto, la dana „Kampanjo kontraŭ Atom-armiloj“ apelacias al la mondhomaro. Ĝiaj argumentoj estas la samaj kiel tiuj de la germana socio „Atomwaffengegner“.

„APPEL“ eldonita de la „Kampagnen mod Atomvåben, Dronningensgade 14, Kopenhago K., Danlando.

... kaj el Germanio

La trian jaron aperas grandformata kalendaro kun pentritaj kolorbildoj de bestoj, unu folio pomonate kun ambaŭflanka teksto en germana kaj esperanta lingvoj. Ankaŭ tiu malmulteksta kalendaro taŭgas bone kiel donaco.

„Bestkalendaro 1966“, 12 p., 42 x 29,5 cm. Prezo: 4, — gm (DM). 2 ekz. al la sama adreso kostas 7, — gm (DM). Vendanto: past. Adolf Burkhardt, 7261 Gechingen über Calw. Pagoj al poŝtekkonto 102549 Stuttgart.

... kaj el Sovetunio

Kantoj de la nuna generacio el diversaj regionoj, grandparte kun politika tendenco, parte sentimentalaj.

„Kantoj de Sovetaj Komponistoj“, Multoblita broŝuro, 36 p., 14 x 21 cm.

Fragmentoj el la poezia kaj teatra verkaro de la laŭdire plej granda poeto en Latvio, Janis Rainis (1865—1929)

„Janis Rainis“, lia vivo kaj verko. Multoblita broŝuro, 32 p., 14 x 21 cm.

Rememoroj pri lastmilitaj suferoj, apelacioj kaj akuzoj, ten-dencaj poemoj.

„Por la Paco“. Multoblita broŝuro, 38 p., 14 x 21 cm.

Travivaĵoj de soveta soldato fuĝinta el la germana kapriteco.

„La Sorto de Homo“ de Miĥail Ŝolohov. Multoblita broŝuro, 40 p., 14 x 21 cm.

Eldoninto de ĉiuj verkoj: Komisiono pri Internaciaj Ligoj, SOD, Otdel Kulture, ul. Kalinina 14, Moskvo, Sovetunio.

... kaj el Svislando

Bonkvalita kalendaro kun grandformataj kolorbildoj pri Svislando. Kalendaraj indikoj kaj tekstoj en la Internacia Lingvo. Rekomendinda donaco por eksterlandaj geamikoj. Nur limigita kvanto disponebla.

„Svisa Esperanto-Kalendaro“, 12 p., 34 x 27 cm. Prezo: 4,50 svizaj frankoj inkl. afranko. Unu plusa ekzemplero po 10 menditaj kalendaroj kiel rabato. Eldonanto: S-ro Karl-Heinz Mischler, Franklinstr. 29, 8050 Zürich, Svislando.

Okaze de la trilanda renkontiĝo ligita kun inaŭguro de la unua Esperantostrato en Svislando, la trafiksocieto Romanshorn plezurigis la vizitantojn per tiu prospekto.

„Romanshorn“, 4 p., 21 x 14,5 cm. Eldoninto: Verkehrsverein Romanshorn, Rütihof, CH-8590 Romanshorn, Svislando.

Ĝojigan Kristnaskon Feliĉan Novjaron deziras

Germana Esperanta Fervoĵista Asocio



Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervoĵista Asocio.